

KRESKO

2018 februaro

KROATA ESPERANTISTA KOLEGARO

Subjektive pri nia literaturo

„Miriga estas la rilato inter la lingvo kaj literaturo: la literaturo ĝermas kaj kreskas el la lingvo kaj inverse – la lingvo nutriĝas kaj kreskas pere de sia literaturo. Ĝi estas evoluo kaj reciproka evoluigo. La historio pruvas al ni, ke lingvoj, parolataj eĉ de malgrandaj nacioj, ne pereas eĉ malgraŭ kelkjarcenta subpremado, se tiu lingvo havas literaturon, kiu spirite nutrante la lingvon, konservas ĝin viva eĉ en la plej malfacilaj ĉirkonstancoj.”

Tiujn liniojn, verkitajn de **Gijsbertus Johannes Degenkamp**, frutempa nederlanda esperantisto, mi prenis kiel devizon por mia verko *Ordeno de Verda Plumo*, kompilita en 2006. Mia leksikono enhavas informojn pri preskaŭ 1000 personoj, kiuj originale verkis en Esperanto kaj fariĝis la avangardo de la Internacia Lingvo. Ne malpli gravas ankaŭ sennombraj tradukantoj, kiuj riĉigis nian literaturon per verkoj de diversaj nacioj kaj popoloj.

La aserto de Degenkamp preskaŭ admonas, ke sen propra literaturo Esperanto starus ĉe rando de abismo, kiu englutas la lingvojn sen intensa literatura kreado.

Kaj kian literaturan kreadon ni havas? Antaŭ nelonge aperis la artikolo *La libroj de la jaro 2017* (<http://www.liberafolio.org/2018/01/17/la-libroj-de-la-jaro-2017/>) de **Paweł Fischer-Kotowski**, kiu resumas nian eldonan agadon dum la pasinta jaro. El la artikolo ni ekscias, ke en 2017 aperis entute nur ĉirkaŭ 150 novaj libroj. En Esperantujo ekzistas apenaŭ kelkaj regulaj kaj seriozaj eldonistoj, do la magra rezulto de ilia agado ne surprizu nin.

La intenco de mia artikolo ne estas lamenti super la stato de nia literaturo, sed inviti la legantojn pripensi la konsekvencojn, tiujn samajn, pri kiuj parolis al ni Degenkamp. Nia lingvo (Esperanto) povas evolui kaj pluvivi nur se ĝi havos sian literaturon, ne malriĉan, sed abundan kaj ĉiaspecan. Kaj literaturo ne estas afero, kiu kreskas per si mem! Por krei literaturon, ni devas havi verkistojn, tradukistojn, eldonistojn kaj librovendejojn, sed antaŭ ĉio – legantojn, de kiuj dependas la tuto.

La lingvoj evoluas parole kaj skribe. Nek ni povas limigi nin nur al la parola lingvo, nek permesi ke nia literaturo ekzistu nur virtuale, en interreto. La forteco de iu literaturo ankoraŭ longe esprimiĝos per nombro da aperintaj libroj. Des pli ĉar jam nun evidentas postsekvoj de senkritika publikigo de niaj verkoj en Interreto, kie ili aperas kriplige korektataj kaj sen sufiĉa redakta kaj editora laboro. Skriba, kaj aparte presita literaturo, devas celi ne nur transigi la sciojn de la verkisto al la leganto, sed ankaŭ riĉigi la lingvon per ĉiam nova vortfarado, adaptanta sin al aktualaj sociaj tendencoj.

Zamenhof mem komprenis la gravecon de la literaturo, kiu ekde la komenco estis taŭga maniero por elprovi la lingvajn nuancojn kaj multigi ĝiajn esprimeblecojn, enkonduki novajn vortojn kaj fine fari Esperanton tute fleksebla, ne nur por beletra, sed ankaŭ por scienca kaj parola funkcioj.

Ne malpli konsciis pri tio ankaŭ la esperantistoj mem, elektinte la 15-an de decembro kiel *Tagon de Esperanta libro*. Sed kie perdiĝis la bona praktiko de antaŭaj generacioj, kiuj almenaŭ tiutage aĉetadis librojn? Pri ĝia foresto atentigas la japana samideano **Hori Jasuo**, kiu lanĉis la *Esperanto-sumoon*, ĉenon da legantoj, kiuj regule konsumas la Esperantan literaturon. Lia ideo estas la unua paŝo por krei la legantan publikon. Kaj, kiel mi jam diris, tiu publiko estos motoro de la tuta sistemo de nia literaturo, kaj ankaŭ vi, kara leganto, povas fariĝi ĝia ŝraŭbeto!

Kaj fine mi devas turni vian atenton al ankoraŭ unu grava elemento de la tuto: por ke la Esperanta libro estu konsiderata valora parto de la tutmonda literaturo, krom la enhavo, ĝi devas posedi ankaŭ belan veston. Neniu plu volas aĉeti malbelan broŝuron, malgraŭ ĝia leginda enhavo. Pri tiu fakto konscias niaj nuntempaj eldonistoj. Mi aparte menciui la tiucelajn strebojn de **Tomasz Chmielik** el Pollando kaj la stabo, kolektiĝinta ĉirkaŭ li.

Josip Pleadin



La libroj de la jaro 2017

Ĉi tiu artikolo estas represita el la blogo *parenteze.net* kun la afabla permeso de la aŭtoro **Paweł Fischer-Kotowski** el Varsovio.

La jaro 2017 estis avara je novaj Esperanto-libroj. En la lastaj 12 monatoj sur la bretoj de la Libroservo de UEA aperis nur iom pli ol 150 novaj varoj, plejparte libroj. Ne temas nur pri libroj esperantlingvaj. Tiuj, kiuj ne estas en Esperanto, estas tradukoj el Esperanto aŭ ili temas pri la lingvo kaj movado.

Ĉiuj novaj libroj estas menciataj en la rubriko *Laste aperis* de la revuo *Esperanto* kaj en la samtitola reta novaĵletero. Ĉi-jare la rubriko aperis en 7 numeroj, dum pasintjare la listo publikigis 10 fojojn. Eĉ se la kvanto de novaĵoj estas malpli granda, ne nepre estas facile orientiĝi en la merkato. Kiuj interesaj titoloj surmerkatiĝis en 2017? Same kiel pri 2016, mi pretigis subjektivan trarigardon.

Prozo originala

Dum la ĵus finiĝinta jaro surmerkatiĝis tri novaj originalaj romanoj, ĉiuj el plumoj jam konataj al la publiko. La unua el ili estas *Amo inter ruinoj* de Trevor Steele, kiu fakte eliris el la presejo ankoraŭ fine de la antaŭa jaro kaj tial portas la jaron 2016 titolpaĝe. Kvankam la intrigo disvolviĝas en la Esperanto-medio de la komencaj 1990-aj jaroj, la titolaj „ruinoj” ne priskribas nian movadon, kiu tiutempe estis pli vigla, sed aludas la disfalantan tiam Sovetunion. La ĉefrolulo estas la aŭstraliano Travis, kio povas pensigi kiagrade la rakonton diktis la realo. La libro estas verkita en Steele-a stilo, spicita per manpleno da kuraĝaj scenoj.

Ĉe la sama eldonejo aperis fine de 2017 ankaŭ *Murdo en la teatro*, la sepa krimromano de Ronald Cecil Gates. Li estas sendube nun la plej fekunda aŭtoro de tiu ĝenro en Esperanto. Ĉi-foje la trovita mortinto estas aktoro, kiu baldaŭ devus surscenejiĝi en la universitata teatro. Ankaŭ ĉi tiun fojon la murdiston serĉas la komisaro Roberto Elis, sed

verŝajne li bezonis por tio pli da tempo, ĉar la libro, kun 150 paĝoj, estas pli longa ol la antaŭaj verkoj de Gates.

Tute alia estas la tria romano, *El ombro de l' tempo* de Sten Johansson, kun psikologiaj ambicioj. En la romano la nuntempo interplektiĝas kun la 1970-aj jaroj. Tiel la bildoj el la juneco de la protagonisto helpas nin kompreni liajn hodiaŭajn sentojn kaj decidojn. Interese kiom aŭtobiografia estas tiu libro, en kiu la ĉefrolulo estas verkisto...

Ne romano, sed ene de la limoj de la rubriko „prozo originala”, estas la libro de Kalle Kniivilä *La strato de Tanja*. Ĉi tiu nefikcia rakonto, verkita surbaze de dokumentoj kaj rememoroj, pentras historion de unu el la sankt-peterburgaj stratoj en la lasta jarcento. La aŭtoro uzas la 1,5 kilometrojn longan vojon kiel pretekston por rakonti pri la vojo de Sovetio kaj la post-soveta Rusio. Same kiel la tri antaŭaj libroj de Kniivilä, ankaŭ ĝi aperis preskaŭ samtempe en finna, sveda kaj Esperanta eldonoj.

Prozo tradukita

Malofte ni spertas ke iu romano freŝe aperinta nacilingve kaj aprezata de vasta landa publiko, tuj ricevas Esperanto-tradukon. Tiel okazis pri *La nigra patrino Tero* de Kristian Novak, kiun elkroatigis Josip Pleadin. Alia atentinda traduko estas la galega *Memorajoj de kampara knabo* de Xosé Neira Vilas, kiun esperantigis Suso Moinhos. Ĉi tiu dua eniris la prestiĝan Serion Oriento-Okcidento kun n-ro 53.

Notindas ankaŭ *Kara mia homo* kaj *Mi respondas pri ĉio*, la du lastaj volumoj el la trilogio *La afero al kiu vi servas* de la fama soveta verkisto Jurij German, en la Esperanto-versio de Jurij Finkel.



Paweł Fischer-Kotowski

Poezio

Legu po-ete estas krono de la traduka laboro de Gerrit Berveling. Sur pli ol 400 paĝoj ĝi kolektas liajn disajn poemojn tradukitajn tra la lastaj jardekoj. Jam la titolo sugestas, ke engluto unufoja de la tuto ne eblas.

Por tiuj, kiuj konas *Dialogo* de Júlia Sigmund, longa enkonduko pri la nova *Doloro* ne necesas. Originala – tre bela! – Esperanta poemo de Sigmund aperas en kelkdeko da tradukoj (ĉi-foje 54). La tuto en bela formo, kiu igas la eldonaĵon taŭga ideo por donaco. Mi mem ne povas ĝui la tuton, sed laŭ la interparoloj kaj komparoj mi konkludas ke iuj el la tradukoj estas etaj majstroverkoj.

Esperanto-movado

La plej grava primovada libro en 2017 estas sendube *Kie miozotas memor'* de Ed Borsboom, kiu eble unuavide ne ŝajnas tia pro sia malgranda formato. Kolekto de trideko da esperantistaj portretoj en mallonga, anekdoteca formo estas io, kio povas ekinteresi

eĉ tiujn, kiuj „ĉi tien venis por ebriigi...”. Kvankam seriozaj esperantologiaj studoj, ankaŭ biografioj, estas bezonataj – kaj Borsboom mem estas sukcesa sur tiu kampo kun siaj *Vivo*-j de Lanti kaj Cseh – tiu ĉi formo povas atingi pli vastan publikon. Tio ne nur kontribuas al konstruo de komuna fundamento por la esperantistaro (kaj ne nur novuloj!), sed ankaŭ povas sproni al pliaj esploroj kaj legaĵoj pri unuopaj personoj kaj fenomenoj. Nepre rekomendinda!

Lige kun la 100-a mortodatreveno de L. L. Zamenhof UEA edonis *Zamenhof en Varsovio* de Roman Dobrzyński, Esperanto-version de la pollingva originalo eldonita samjare. La libro pretendas esti samtempe iom gvidlibro pri Varsovio, iom historia verko pri la urbo, iom pri Zamenhof mem. La aŭtoro nenecese serĉas polecon de D-ro Esperanto.

Alia libro kiun mi klasis primovada, kvankam ĝia teamo estas iom pli vasta, estas biografio pri „eksterordinara homo” (eĉ laŭ la subtitolo) *Francisko Valdomiro Lorenz*, verkita en la ĉeĥa de Vlastimil Novobilský (Esperanto-traduko de Margit Turková). *Omaĝe al Tibor Sekelj* estas kolekto de kvar prelegoj prezentitaj en la samtitola seminarieto en Bjelovar en oktobro 2016.

Reeldonoj

La eldonejoj Libro-Mondo kaj Fonto daŭrigas laŭdindan reeldonan agadon. Ĉe la unua reaperis interalie la versdramo de Geraldo Mattos, *Ivan la Sesa*. La originala tragedio aperis unuafoje en 1953 kaj estis tre avangarda por sia tempo.

Aliaj reeldonoj de originalaĵoj estas *Karlo* de Edmond Privat – per ĉi tiu 16-a el la oficialaj eldonoj la rakonto certigas al si la unuan lokon inter la plej ofte reeldonitaj Esperantaj beletraĵoj. Ĝi ja estas konata al preskaŭ ĉiuj esperantistoj, verkita en facila lingvaĵo kaj legata kutime tre frue post la unua kurso. Nun por la unua fojo en iom arta eldono, kun malmola kovrilo.

Sur la merkaton revenis ankaŭ *Printempo en la aŭtuno* de

Julio Baghy, kiu laŭ la intencoj de la eldoninto malfermas novan eldonserion, en kiu aperos la tuta verkaro de Paĉjo – fakte tiu, kiu legis la vastajn tavolojn de esperantistoj en la 1930-aj jaroj kaj ĝis nun restas aŭtoro ŝatata kaj konata en nia komunumo, eĉ por tiuj, kiuj ne aparte interesiĝas pri literaturo.

La fama traduko de la pola *Faraono* de Bolesław Prus en la plenumo de Kazimierz Bein fermas la liston de la reeldonoj de Fonto de la verkoj de Kabe. Ankaŭ nun la rakonto pri malnova Egiptio aperas en tri volumoj, kvankam aspekte pli modestaj ol la antaŭaj du eldonoj, kun kovrilpaĝoj laŭ la stilo de la fruaj 1990-aj jaroj. Tamen, ĝi ja estas interesa por iu, kiu ne volas aŭ ne povas legi ĝiajn polvokovritajn antaŭulojn (la lasta el 1957).

La eldonejo Riveroj rehavigis al ni la novelaron *Pri arto kaj morto* de nia plej fama japana literaturisto, Miyamoto Masao. Temas pri represo de la kolekto de nefikciaj originalaj rakontoj el 1967. Atentinda ne nur pro la „ekzotikeco” de la aŭtoro, la ĉefa reprezentanto de la Oriento en la Esperanto-literaturo, sed ankaŭ pro ĝiaj artaj valoroj. Alia orientaĵo estas kolekto de noveloj, kiun Korea Esperanto-Asocio aperigis lige kun la 102-a UK en Seulo. Nome, la koreaj samideanoj pretigis duan eldonon de la interesa *Korea antologio de noveloj*.

Pro kronikista devo mi menciis ankaŭ la reeldonojn de la astronomia manlibro *La kosmo kaj ni* de la duopo David Galadí-Enríquez – Amri Wandel, kaj de la brila ese de Claude Piron *Psiĥaj reagoj al Esperanto*, kiu verŝajne nur pro la fantazio de la eldoninto ricevis novan ortografion (origine: *Psikologiaj reagoj...*). Estas io perversa en „bonlingvigo” de la titolo donita de iu, kiu aŭtoris *La bona lingvo...* La 55-paĝa pironaĵo enhavas ankaŭ la eseon *Afazio* kaj du aliajn lingvorilatajn tekstojn.

Faka literaturo kaj (inter)lingvistiko

Da fakaj verkoj ne venis abundo. Krom la tradicia *IKU-*

libro, ĉi-jare eldonita sur luksa, peza papero, kun malmola kovrilo (tute netaŭge por tia libro, kun same netaŭga prezo), venis ankaŭ *Elektitaj tekstoj pri internacia juro* de Ivo Lapenna. Temas pri kvardeko da tekstoj publikigitaj en la jaroj 1949–1992 tra la gazetaro, nun kolektitaj kaj eldonitaj unuvolume kaj tiel pli facile konsulteblaj.

El la kampo (inter) lingv(istik)a menciindas nur la eldonaĵoj de André Cherpillod. Precipe la kolekto *Promenante tra la lingvoj...*, en kiu la aŭtoro malkovras plej diversajn strangaĵojn kaj mirindaĵojn de niaj lingvoj, sed ankaŭ la broŝuro *Universalglot* pri la unua planlingvo de natureca tipo el 1868 kaj lia traduko de la 35-paĝa lernolibreto *Okcidentaleno en kvin lecionoj*.

Vortaroj kaj terminaroj

La nove aperintaj vortaroj estas la Serba-Esperanta (27 mil kapvortoj), Esperanta-vjetnama (10 mil kapvortoj, abundaj ekzemploj) kaj Esperanta-ĉeĥa (16 mil kapvortoj). Krome, aperis *Rekomendata terminaro Esperanto-angla kaj angla-Esperanto por tradukantoj de oficialaj dokumentoj kaj gazetaraj komunikoj*, kompilita de Humphrey Tonkin kaj Victor Sadler. La nomoj de la aŭtoroj sufiĉu kiel recenzo pri ĝia kvalito – nepre havenda por ĉiu, kiu en nia movado serioze okupiĝas internacinivele pri eksteraj rilatoj.

Alilingvaj libroj

El la novaj libroj en la roterdama libroservo, kiuj ne estas en Esperanto, la plej grava estas la anglalingva eldono de *La danĝera lingvo* (*Dangerous Language*) de Ulrich Lins en la traduko de Humphrey Tonkin. Iom kosta (ĉi-jare ĝi okupas la unuan lokon en la listo de la plej multekostaj: € 192,30!), bele eldonita ĉe neesperantista eldonejo, en du volumoj. Tiu libro ebligas iom komprenigi la Esperanto-movadon al neesperantistaj sciencistoj. Mi supozas, ke malmultaj emos aĉeti ĝin kaj meti poste sur la propran

librobretaron, sed se vi havas la komforton libere elspezi tiujn ducent eŭrojn, eble konsideru fari donacon por iu proksima al vi universitata aŭ alia scienca biblioteko?

Alia bombo estas la germana traduko de *Tur-strato 4 (Turmstrasse 4)*, verkita de Hans Weinhengst kaj tradukita de Christian Cimpa. Ne ofte aperas nacilingvaj tradukoj de niaj originalaj romanoj, kaj tiun germanigon de verko el 1934 oni tute ne atendus. Tamen, la tradukinto sukcesis konvinki la eldonejon aperigi la tradukon kaj la rezulto estas admirinda. Mi mem ne konas la germanan, sed de aliaj mi aŭdis nur laŭdojn pri la lingvaĵo. La aspekto estas modela. Ho, se niaj Esperanto-libroj povus aperi tiel bele eldonitaj!

La specie bambina estas itala traduko de la ĉefverko de

William Auld el la plumo de Nicolino Rossi. Kiom malfacile tradukebla estas *La infana raso* scias ĉiu, kiu almenaŭ trafolumis la libron. Pri la rezulto mi ne kompetentas juĝi, sed mi instigas niajn italajn samideanojn ĝui la verkon. Aldonan legoplezuron devus certigi la spegulpaĝa preso de la originala teksto en Esperanto.

Aliaj

Atenton meritas ankaŭ la 100-a numero de *Informilo por Interlingvistoj*. La jubilea eldono de tiu bulteno konsistas sole el la indekso de la ĝisnuna enhavo, kompilita de Ino Kolbe kaj Till-Dietrich Dahlenburg. Eĉ se oni ne havas la tutan kolekton ekde 1992, kun la indekso oni povas almenaŭ orientiĝi ĉu indas serĉi la bezonatajn informojn kaj en kiuj numeroj. Cetere, estas ĝojige ke

post la morto de la fondinto kaj unua redaktoro, Detlev Blanke, troviĝis personoj, kiuj daŭrigas la eldonadon de tiu kvaronjara publikaĵo.

Inter la menciindaj libroj el 2017 estas ankoraŭ la nova eldono *Pasporta Servo*, kiu revenis en la presita formo post 6-jara paŭzo. Eĉ se ĝi enhavas diversajn misteraĵojn el la tipo de *Jarlibro 2017*, pro la nunaj cirkonstancoj ĝi estas laŭdinda jam pro la fakto mem ke ĝi entute aperis.

La fama lernolibro de Stano Marček, *Esperanto per rekta metodo*, ĉi-jare ricevis tradukojn en la latva kaj araba lingvoj kaj estas jam certe lernolibro nesuperebla de iu ajn alia per nombro de tradukoj. Precipe al tiu lasta mi deziras merkatan sukceson, al kiu certe multe kontribuos Renato Corsetti.

Paweł Fischer-Kotowski

La genezo de Esperanto: La lingvoj de Zamenhof



La 11-an de decembro 2017 en la Klubo de Muziko kaj Literaturo en Vroclavo (Pollando) okazis renkontiĝo, kiun kune preparis la Eŭropa Centro de Interkultura Edukado (Esperanto-organizaĵo) kaj Klubo de Muziko kaj Literaturo (neesperantista organizaĵo). La renkontiĝo finis la tutjaran festadon de la Jaro de Zamenhof fare de Eŭropa Centro de Interkultura Edukado. Dum tiu jaro ni prezentis multajn programojn kaj prelegojn, kiuj rekomendis la Esperanto-lingvon kaj la Esperanto-movadon. Tio

donis pozitivajn rezultojn, ĉar al la oktobre komenciĝinta Esperanto-kurso en januaro aldoniĝos novaj kursoj kaj multaj personoj komencis interesiĝi pri Esperanto kaj rigardi ĝin multe pli favore.

La lasta programo de la festado estis la prelego de profesoro **Christer Kiselman** *La genezo de Esperanto: la lingvoj de Zamenhof*, kiun interpretis **Małgosia Komarnicka**.

Profesoro Kiselman dum sia prelego priskribis mallonge la vivon de Ludoviko Zamenhof, sed antaŭ ĉio li preparolis kvin

lingvojn, pri kiuj laboris la kreinto de Esperanto. Laŭvice li prezentis *Lingve Uniwersala*, *Lingvo Uniwersala*, *la Mondo Lingvo*, *Lingvo Internacia* kaj la lingvon por hilelistoj. La publiko ekkonis multajn gravajn kaj eĉ nekonatajn faktojn, ĉar kelkaj estis malkovritaj lastatempe.

Fine de la prelego profesoro Kiselman resumis la preparolitajn informojn kaj komparis tiujn lingvojn, montrante ŝanĝojn, kiujn faris Zamenhof, kreante la lingvon ĝis ekesto de la konata lingvo Esperanto.

La prelego plenumis gravan informan rolon, konigante al la publiko la valoron kaj uzeblecon de Esperanto. Profesoro Kiselman trafe prezentis ankaŭ la informojn pri profitoj, kiujn donas kono de Esperanto. Dum la tuta renkontiĝo regis atentokapta etoso. La sama etoso akompanis la Esperanto-kurson, kiun gvidas **Małgosia Komarnicka**, kiun antaŭ sia prelego vizitis profesoro Kiselman. La renkontiĝo estis granda travivaĵo por studentinoj, kiuj oktobre komencis lerni Esperanton, ĉar la unuan fojon ili havis eblecon interparoli kun esperantisto-eksterlandano.

Małgosia Komarnicka

Ĉu ni havas defendan respondon?

Ke al la „verda popolo” ne mankas tia kaj tia propagando, ne estas dubo. Foje la troa lavango de ĝi eĉ motivigas kelkajn, kiuj jam lernis tri lecionojn de nia lingvo, la aferon forlasi, ja oni ne bezonas tre profundstudan scion por vidi, ke tiu propagando estas unuflanke plena da entuziasma ardo, foje eĉ da ideologia kaj ekstremkaze sekteca religiaĉa agreso, kaj aliflanke tamen plena da simpligoj, neveroj aŭ rekte mensogoj, troigoj kaj neprecizaĵoj. Propagando havas propran mekanismon de kontraŭefiko. Ju pli malfidela al la vero, ju pli laŭta kaj agresiva, ju pli simila al sekteca, ideologia kaj politika propagando, des pli kontraŭefika kaj tiel malutila por sia deklarita celo. Unu el la trajtoj de ĉiaspeca propagando estas, ke la plej laŭtaj propagandistoj kutime estas tiuj, kiuj la propagandan materion mem tre malbone konas kaj laŭ ĝiaj principoj mem ne vivas. Dum mia longa uzo de la internacia lingvo kaj sociumado kun ĝiaj adeptoj mi kun miro kaj bedaŭro devis konstati, ke multaj propagandistoj kondukas simile kiel multaj falsaj predikantoj, predikante akvon kaj kaŝe trinkante vinon.

Ĉu do prefere silenti, buŝe kaj plume? Simple uzi la lingvon, tamen ne rekomendi ĝin al aliaj, ne zorgi, ke la komunumo de ĝiaj parolantoj kaj utiligantoj kresku, en kresko ankaŭ maturiĝu. Ĉu tio estus la vera pozitiva alternativo al la kutima, do pli malpli supraĵa kaj ne tre konvinkopova propagando?

En mia Biblio mi ne vidas pravigon de papismo, tamen mi ne povas kaj ne volas negi, ke unuopaj episkopoj de Romo spite la senfundamentecon de sia ofico kontribuis bonajn aferojn por la homaro, almenaŭ por la surtera vivo. Tiel mi ŝatas anekdoton pri la papo Johano XXIII-a, kiun laŭdire vizitis pli aĝa kaj tre riĉa damo el Usono, ege fervora katoliko. Papo Johano havis bonajn kondutmanierojn, estinte antaŭ la milito diplomato en Turkio, nome nuncio de la Sankta Seĝo en Konstantinopolo (Istambulo),

do li ĝentile kaj pacience aŭskultis la fajran katolike propagandan parolon de la misie disponita damo el Ameriko. Kiam ŝi tamen faris mallongan paŭzon por esti prizorgita per oksigeno, la papo tion utiligis, dirante al ŝi: „Sinjorino, eble vin tio surprizos, kion mi al vi nun konfesos, sed bonvolu kredi aŭ ne – mi jam estas katoliko...” Mi observas, ke similaj skeĉoj okazas ofte ankaŭ en esperantujo. Ofte mi renkontis homojn, kiuj, sciante pri mia esperanta partidento, komencis min persvadi favore al



Vinko Ošlak

Esperanto, sen ke ili mem sciis en la propagandata lingvo unu nuran vorton, sen ke ili montrus emon mem por la afero ion ajn fari, sed arde postulante, ke tion faru la aliaj, antaŭ ĉio la ŝtato...

Ĉar mia kutimo estas, malfermi la Biblion – bonŝance ni havas kompare tre bonan esperantan tradukon de ĝi – se mi serĉas respondon al la demandoj, superantaj la ĉiutagajn banalaĵojn de la vivo, mi ankaŭ serĉante la alternativon al la propagando, per kiu oni kutime pli da „kandidatoj” timigas kaj forpelas ol ilin altiras, procedis same kaj malfermis mian Biblion por tie trovi adekvatan respondon. Ne tre longe mi devis serĉi. En la mallonga epistolo de la apostolo Petro mi trovis perfektan respondon, kiu kompreneble estis

donita por la unua generacio de la disĉiploj de Jesuo, sed ankaŭ por ĉiuj sekvaj generacioj ĝis la fino de la eono, mi trovis konsilon, kiu senrezerve povas esti adoptata kaj utiligata ankaŭ koncerne la internacian lingvon de Zamenhof. Jen la teksto:

»Estu ĉiam pretaj doni defendan respondon al ĉiu, kiu vin demandas pri la motivo de la espero en vi, sed kun humileco kaj timo« (1 Pet 3,15).

Nia lingvo baziĝas, kiel jam la pseŭdonimo de ĝia iniciatinto Zamenhof klare indikas, fariĝinta poste la nomo de la lingvo, sur unu el la tri kernaj kategorioj de la kristana kredo: la *fido*, la *espero* kaj la *amo*. Tiuj tri kategorioj havas interesan karakteron, ke ĉiu el ili povas esti komprenata ankaŭ kiel la sinonimo por la du aliaj. Kio estas la fido en la biblia senco, se ne esperi, ke la lastan venkon ĝuos la amo! Kio estas la espero, se ne kredi, ke Dio estas amo! Kio estas la amo, se ne esperi, ke la fido finfine montriĝos prava! Kompreneble oni povas en banala senco „kredi ĉion, pri kio oni ne havas scion”, tamen tio ne estas la kristana kredo resp. fido. Same oni povas „esperi je bona eliro de la aferoj”, luante sian monon kaj esperi je profito per interezoj. Sed tio ne estas la kristana kompreno de la espero. Kaj en niaj lingvoj, kiuj ne konas kvar diversajn nociojn pri „amo”, kiel la greka tion konas, oni per la sama vorto priskribas la homan rilaton al Dio, al sia proksimulo kaj al marmelado, sed tio ne estas la amo (greke: *agape*; latine: *caritas*), pri kiu parolas la Skribaĵo.

Aŭtenta, „plensanga” uzanto de Esperanto do estas la homo, kiu sian lingvan apartenon fundamentas same, kiel ĝin fundamentis doktoro Zamenhof – sur la ESPERO. Jam tuj dekomence, okaze de la unua universala kongreso en la jaro 1905, nia majstro distancigis sin energie de tiuj, kiuj en Esperanto volas vidi nur lingvon praktikan por komerci, por havi profiton kaj

utilon. Kvankam li religie ne estis kristano, tamen firme kredanta en Kreinton kaj ties moralan leĝon, li en propra vivo kondukis plene kristane, konsiderinte ĉiujn tri bazajn kategoriojn: la fidon, la esperon kaj la amon. Tiel la spirita fundamento de nia lingvo ne povas esti, ekzemple, la „luktado por supervivi”, la centra kategorio de evoluciismo kaj per ĝi fundamentata moderna ateismo, ĉar se temas pri tiu principo, la venkanto jam delonge estas konata: la angla! Se la esperantistoj tion oponas, ĉar ili ne povas akcepti maljuston de tia solvo, ili per tio pruvas, ke Esperanto kiel la solvo ne nur praktika, facila, simpla, eleganta ktp., sed antaŭ ĉio justa, ne povas baziĝi sur la doktrino, instruanta kiel sian bazan principon la batalon, el kiu fine venas la venkanto. Laŭ la malfeliĉa rezolucio de la unua kongreso, laŭ kiu estas konsiderata „esperantisto” ĉiu, kiu Esperanton uzas, senkonsidere por kiaj celoj, kompreneble oni povas esti ankaŭ nacionalsocialisto aŭ io al tiu ideologio parenca, kaj bedaŭrinde en la tridekaj jaroj de la pasinta jarcento tiu strangaĵo kaj kanajlaĵo ankaŭ okazis. Tiel kompreneble ankaŭ evoluciisto povas eĉ tre bone paroli kaj skribi Esperanton, sed ĉu li povas, demandita pri la motivo lerni Esperanton, vere *ĉiam esti preta doni defendan respondon al ĉiu, kiu lin demandas pri la motivo de la espero en li* – tio estas alia demando, pri kiu la logiko jam havas pretan respondon, ke tio estus pura ekzemplo de kontradikcio.

Bone. Unu afero estas, kion do prefere entrepreni: ĉu daŭre propagandi per ne tro fidindaj sloganoj – aŭ prefere trovi kaj *doni defendan respondon al ĉiu, kiu lin demandas pri la motivo de la espero*, sekve ankaŭ de Esperanto, la lingva konkreta derivaĵo de la *espero* kiel principo. Sed bezonata estas ankaŭ la dua afero: tiam respondon trovi kaj ĝin logike formuli surbaze de la baza principo de la *espero*. Kie trovi tiun ĉi respondon? Mi trovis ĝin en la sama libro, en la Biblio. Mi tion malkovris jam antaŭ eble dekkvin jaroj, kiam en la slovena gazetaro ekflamis polemiko por kaj

kontraŭ permeso, ke la en Slovenio vivantaj islamanoj konstruu en Labako (Ljubljana) kaj sekve ankaŭ en aliaj urboj moskeon. Tiam granda parto, ĉu katolika, ĉu maldekstrecata-ateisma, tian permeson kontraŭis. Ili uzis por tio tre banalajn kaj ne tre kredindajn argumentojn, kiel malkongruo de la moskea arkitekturo kun la tradicia arkitekturo en la slovena regiono. Ili blinde ignoris, ke la tuta lando estas jam delonge plena de tute fremdaj arkitektaj formoj. Ĉu ne similas preskaŭ ĉiu moderna grandvendejo paganan templon? Finfine ankaŭ la tradiciaj katolikaj, ortodoksaj kaj protestantaj preĝejoj ne estis arkitekto inventitaj de la slovenoj, sed same importitaj el aliaj landoj, kiel tio estus la kazo de moskeo. Tiam mi publicis en la taggazeto *Delo* artikolon, per kiu mi pledis klare favore al tia permeso. Kaj la biblia teksto, per kiu mi tion argumentis, estis la sama, per kiu mi ankaŭ povas argumenti favore por Esperanto. Mi starigis al mi mem kaj al ĉiuj slovenaj katolikoj, protestantoj kaj ortodoksanoj simplan demandon: Kion mi deziras, ke la reĝo de Sauda Arabio al ni permesu. Mi tiam ankoraŭ estis mem katoliko, do kian deziron mi havas en mia koro plenumbla en tiu lando? Se mi prenas mian katolikan kredon serioze, tiam mi ne povas havi alian bazan deziron ol, ke niaj saŭdaj amikoj al ni permesu tie same libere kiel en Slovenio anonci la evangelion al tiuj, kiuj ĝin volas aŭskulti – kaj konstrui tie katolikajn aŭ protestantajn aŭ ortodoksajn preĝejojn. Se mi tiam deziron ne havas, tio signifas, ke mia katolika aparteno ne estas aŭtenta, ke mi ĝin simple blufas. Bone, mi certe ne estas en tiu punkto naŭva, mi estas sufiĉe bone informita, ke la islama reĝlando Sauda Arabio pri tio ne volas diskuti. Ili financis en Vieno „internacian instituton” por interreligia dialogo, sed en Vieno, ne en Riado! Mi tion scias, mi ne havas iluzion, ke iam tio ŝanĝiĝos, ja mi la Noblan Koranon legis, unue ĝuste en bona esperanta traduko. Kaj ĉar ankaŭ aliaj katolikoj kaj eĉ ateistoj en Slovenio tion same bone sciis, ili opiniis havi per tio bonan argumenton kontraŭ

tia permeso, dirante: Kiam la islamanoj permesos en siaj landoj al kristanoj plenan religian liberon, tiam ni povos diskuti pri moskeo en Slovenio. Kompreneble ili ne sciis aŭ ludis nescion, ke jam dum la unua mondmilito la komandejo de la aŭstra-hungara armeo lasis en la montaro inter Italio kaj nuna Slovenio konstrui etan moskeon por la bravaj islamaj soldatoj kaj oficiroj el Bosnio. Sed kion pri tiu dilemo diras la vorto de Dio? Mi serĉis kaj trovis rektan respondon, diranta jenon:

„Ĉion ajn do, kion vi deziras, ke la homoj faru al vi, vi ankaŭ faru al ili; ĉar ĉi tio estas la leĝo kaj la profetoj” (Mat 7,12).

En la Biblio la redaktistoj tiun ĉi versiklon titolas „la ora regulo”. Se oni precize legas, kio ĉi tie estas dirita, el la buŝo de Jesuo mem, oni devas konstati, krom se blinda, surda kaj malprudenta, ke la kondiĉo por devi ion fari ne estas la konduto de la alia flanko, sed simple mia deziro. Ne gravas, ĉu mia proksimulo aŭ kontraŭulo plenumas mian deziron, por ke mi sekve devus mian parton fari, sufiĉas jam, plene, la deziro en mia koro. Se la alia sian parton ne faras, tio estas lia manko kaj sekve lia perdo, ne mia. Kaj se ni en la „oran regolon” de Jesuo enmetas konkretan deziron: ke la diversaj kristanoj, ĉu aŭtentaj aŭ nur laŭnomaj, estas alia demando, ricevu permeson libere vivi kaj anonci sian kredon en Sauda Arabio, kio inkluzivas ankaŭ permeson konstrui siajn preĝejojn, tiam Jesuo tute klare diras, ke la kristanoj aŭ pli reale „kristanoj” kun tia deziro devas senkondiĉe tian permeson liveri al la islamanoj, vivantaj inter ili. Oni povas imagi, ke nek la katolikoj nek la ateistoj havis plezuron kun mia artikolo en *Delo*. Ili demonstris sian „aŭtenton”, ne nur ignorante, sed rekte kontraŭstarante la kernan eldiron de Jesuo, je kiu ili eme referencas, tamen kun siaj kaŝitaj rezervoj. Mi estas ĝoja, ke finfine en Labako staras tre bela moskeo, kvankam en Sauda Arabio oni daŭre ne ricevas permeson plene kaj publike vivi sian kristanan kredon. Tio neniel difinas mian

rigardon al islamo kaj ĝiaj fontoj kaj ĝia historia praktiko, sed tio difinas mian kredon, ke Jesuo sciis, kion li al siaj disĉiploj ordonis kaj tio neniam povas esti ŝanĝita.

Nun, kiamaniere oni povas tiun ĉi eldiron de Jesuo, lian „oran regulon”, apliki, kiam temas pri Esperanto? Por tion diveni, oni devas al si starigi demandon: Kio estas mia sincera kordeziro koncerne la lokan kaj tutmondan komunikan sistemon? Bone, oni povas havi deziron, ke ĉiu persono en la mondo scipovu paroli kun mi en mia gepatra lingvo, konkrete la slovena. Sed tia deziro nek estas realigebla nek justa – kaj nejustan deziron oni ne povas apliki per la „ora regulo” de Jesuo. Oni ankaŭ povus havi deziron en sia koro, ke okazu miraklo kaj mi scipovu paroli en ĉiu lingvo, renkontata en la mondo. Ankaŭ tia deziro estas principe nerealigebla kaj iamaniere ankaŭ maljusta, ĉar per tio, se la miraklo okazus, mi estus privilegiita homo inter ĉiuj. Restas la tria tiutipa deziro, ke ripetigu la miraklo el Jerusalemo la kvindekajn tagon post la pentekosta festo, kiam la Sankta Spirito intervenis per mirakla simultana tradukado, ke ĉiu komprenis la predikojn de la apostoloj, senrigarde, en kiu lingvo ili parolis. Tio okazis unu nuran fojon kaj sur tre limigita loko por tiel doni al la ĵus estiĝinta komunumo sufiĉan pruvon kaj kuraĝenergiecon por spiti la baldaŭ sekvajn persekutojn. Sed ĉu oni povas havi deziron vere plenumeblan kaj samtempe justan? Jes, oni povas sincere deziri, ke ni ĉiuj investu la saman fidon, esperon kaj amon kaj lernu la saman duan lingvon, kiu servu kiel la komuna lingvo por ĉiuj, ne

intervenante en la internan vivon de ĉies gepatra lingvo, kulturo kaj idento. Precize tian lingvon kaj „internan ideon” de ĝi kreis doktoro Zamenhof. Se oni do estas racia kaj volas procedi juste, la sola ebla deziro estas, ke ĉiuj lernu kaj en la internaciaj kontaktoj uzu la neŭtralan internacian lingvon Esperanton. Se mi tion vere deziras, tiam la instruo de Jesuo min motivigas tion unua mem fari, senkonsidere, ĉu ankaŭ aliaj tion faros aŭ eble eĉ kontraŭstaros aŭ ekstremkaze eĉ tiajn homojn persekutos. Tio estas la plej klara ekzemplo, ke la Biblio ne nur permesas, sed rekte motivigas la homojn utiligi la solvon, kiun la Spirito de Dio al Zamenhof inspiris, kiel mi kredas.

Sed, ĉu ne parolis Zamenhof mem pri „ora regulo”? Ĉu li sur ĝi ne fundamentis sian religian projekton „hilelismo” kaj poste „homaranismo”?

Ĝuste tio estis fatala eraro de nia majstro. Nek la regulo, je kiu li referencas estas „ora”, nek la tuthomara religio povas esti „neŭtrala” analogie kun la lingvo.

Se oni legas la hilelismajn kaj homaranismajn tekstojn de Zamenhof, oni legas tekston, kiu esence diferencas de la ĉi tie citita versiklo el Mateo 7,12. Por tion kompreni, oni devas scii, kial Zamenhof sian religian vizon unue nomis „hilelismo”. Hilel estis juda rabeno el Babilono, kiu vivis proksimume cent jarojn antaŭ Kristo. Li venis al Jerusalemo kaj fariĝis fama instruisto. Unu el liaj disĉiploj estis Gamaliel, konata rabeno el la Biblio. Kaj la disĉiplo de Gamaliel estis Saŭlo, post sia konvertiĝo la apostolo Paŭlo. Do tre grava rabena ĉeno, kies

fina persono estas la plej granda apostolo kaj eksplikanto de la evangelioj. Pri tiu rabeno, Hilel, troviĝas anekdoto, ke li instruis siajn disĉiplojn, kiamaniere resumi la tutan Leĝon de Moseo starante sur unu piedo, do en tre mallonga tempo. Kaj lia resumo tekstis: Kion vi ne deziras, ke aliaj al vi faru, tion ankaŭ vi ne faru al la aliaj! Zamenhof kaj ne nur li, preskaŭ ĉiuj, kiuj pri tiu temo ion diras aŭ skribas, tiun ĉi negativan kaj pasivan sloganon prenas por „ora regulo”. En la plej bona senco oni tion povus preni por „arĝenta regulo”, sed neniel por la ora! La regulon de Hilel oni plenumas jam, dirante: Mi ne deziras, ke iu min priŝtelu, prirabu, batu aŭ mortigu – sekve ankaŭ mi neniun priŝtelos, prirabos, batos kaj mortigos... Ankaŭ tio estas pli bona afero ol ĉion menciitan fari, tamen tio resumas nek la Leĝon de Moseo nek la novan Leĝon de Jesuo. La similan regulon konas ĉiuj religioj kaj filozofioj dise en la mondo – nur Jesuo diris pozitivan kaj aktivan regulon, ke oni devas tion, kion oni deziras de la alia, mem fari, senrigarde, ĉu la alia ankaŭ faros.

Ni havas la biblian sugeston, esti ĉiam pretaj al tiuj, kiuj nin demandas pri la motivo de nia espero kaj de la lingvo, inspirita per la espero, tiun motivon diri kaj ne nur supraj slogane trumpeti niajn klasikajn propagandajn frazojn – kaj ni havas la biblian motivon por nia lingva kaj internidea decido kaj faro: procedi laŭ la deziro en nia koro, sen stumbli per kondiĉoj, ke ankaŭ la aliaj tion faru.

Vinko Ošlak

Korekto

En la artikolo *Afrikanano kantanta en Esperanto* (Kresko n-ro 2, paĝo 17) aperis malĝusta retadreso de Joel Muhire. Ni pardonpetas pro la eraro. Bonvolu noti, ke la ĝusta retadreso de Joel Muhire estas

joelmuhire0@gmail.com

Anonco

La dua prelego el la serio *Forgesitaj samideanoj*, titolita *ILIJA PUHALO, la ĉefa figuro de la Internacia Asocio de la Fervojistaj Esperantistoj (IAFE)*, okazos la **24-an de februaro 2018** je la **11h00** en la societejo de Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj en Zagrebo, **Radnički dol 1**. Bonvenas ĉiuj!

Kroatio konstruos la kvinan plej grandan ponton en Eŭropo


Se vi, kara leganto, iam vojaĝis aŭtomobile el Split al Dubrovnik, vi devis pasi tra Bosnio kaj Hercegovino! Paradokso de tia konstato estas, ke ambaŭ menciitaj urboj troviĝas en Kroatio! Multaj turistoj ne scias, ke apud la urbo Neum, Bosnio kaj Hercegovino posedas mallarĝan parton de la adriatika marbordo, kiu dividas Kroation je du partoj. En la tempo de la federacia Jugoslavio, tiu fakto neniun ĝenis, ĉar oni libere vojaĝis tra la teritorio de Bosnio kaj Hercegovino. Tio ĉesus esti problemo ankaŭ se Bosnio kaj Hercegovino fariĝus ŝtato de Eŭropa Unio, sed ĝis tiam pasos multaj jaroj. Intertempe trapaso de la bosnia-hercegovina limo grave malfaciligas la regulan trafikon, aparte ĉar en sudo de Kroatio troviĝas Dubrovnik, la perlo de ĝia turismo.

Antaŭ multaj jaroj, efektive post la sendependiĝo de Kroatio kaj disfalo de la jugoslavia federacio, oni ekkonsciis pri la ekestinta problemo. Proksimume antaŭ unu jardeko komenciĝis planado de iam konstruota ponto, kiu la surbordan trafikon, anstataŭ tra la teritorio de la najbara ŝtato Bosnio kaj Hercegovino, direktus al la kroata duoninsulo Peljeŝac, kaj de tie al la plej suda parto de Kroatio.

En 2018 verŝajne komenciĝos la definitiva solvado de la trafika problemo en tiu parto de la lando. Fakte, en la Golfo de Mali Ston, Kroatio intencas konstrui la tiel nomatan Ponton de Peljeŝac (kroatlingve: *Pelješki most*), kiu estos unu el la kvin plej grandaj pontoj, kaj la dua en la kategorio de plej grandaj spanoj ĉe pendantaj pontoj en Eŭropo. Ĝi estos unu el la plej ambiciaj konstruaj projektoj iam ajn entreprenitaj en Kroatio, kiu kostos preskaŭ du miliardojn da kunaĵoj (ĉirkaŭ 260 milionoj da eŭroj). Kiom granda ĝi estos, konkludu el kelkaj sekvaj faktoj. Ĝia longeco estos 2.404 metrojn, kaj ĝi staros sur ses pilonoj, inter kiuj estos distanco de 285 metroj.



La bosnia-hercegovina parto de la adriatika marbordo, kiu dividas Kroation je du partoj.



La loko en kiu Kroatio konstruos la ponton.



Tiel aspektos la Ponto de Peljeŝac.

Vertikale en la marfundon estos vibracie enbatitaj faskoj de 9 ĝis 20 ŝtalaj tuboj, kun diametro de 2 metroj kaj longeco inter 60 kaj 120 metroj. La tuboj estos por ĉiam protektitaj kontraŭ korodo kaj plenigitaj per ferbetono. Je la marnivelo tiuj ŝtalaj tuboj estos fiksitaj per grandegaj betonaj blokoj, sur kiuj estos konstruitaj subtenaj betonaj fostoj, kiuj tenos la tutan pezon de la ponto.

La ĉefa parto de la ponto estos „ŝvebanta ŝoseo”, sur kiu okazos trafiko. Ĝi pendos 60 metrojn super la marnivelo. Inter la pontokolonoj troviĝos la navigebla maro kun larĝeco de 200 metroj kaj alteco de 55 metroj, kiu estis interkonsentita kun Bosnio kaj Hercegovino. La ŝoseo estos konstruita en unu peco, kvazaŭ 2.400 metrojn longa kesto kun tri kameroj kaj alteco de 4,5 metroj. Tiu „kesto” estos konstruita surtere, transportata sub la ponton, levata per vinĉoj kaj kunigata kun la ponto per veldado. Ĝi ne estas nova teknologio, sed jam bone konata kaj funkcia konstruteknika procedo.

La ŝoseon tenos oblikvaj streĉiloj, fakte 25 centimetrojn larĝaj tuboj, en kiuj troviĝos centoj da ŝtalŝunroj. Ĉiu streĉilo povos porti ĉirkaŭ 1.200 tunojn, respektive la pezon de 40 komplete ŝarĝitaj trenkamionoj, antaŭ ol rompiĝi. Tiu teknologio estas rezulto de multjaraj spertoj de generacioj da konstruĝinieroj.

La ponto havos neniun angulon, ĉar en tiaj lokoj, eksponitaj al la agresema kaj sala marklimato, okazas la unuaj difektiĝoj. La maketo de la ponto estis eksponita al vento-batoj de 250 kilometroj je horo, kvankam en la regiono, kie la ponto estos konstruita, la maksimumaj mezuritaj vento-batoj estis 160 kilometroj je horo. Sammaniere estis testita la 3,2 metrojn alta kontraŭventa barilo, kiun la ponto posedos. Oni pensis ankaŭ pri la klimataj ŝanĝoj kiuj povus okazi dum la venonta jarcento, altiĝo de la marnivelo, aero-varmigo kaj plifortigo de la vento. La aŭtomobiloj povos veturi sur la ponto je maksimuma rapideco de 200 kilometroj je horo.



Marjan Pipenbaher, la ĉefprojekto.

La Ponton de Peljeŝac ĉefprojekto la 60-jara slovena arkitekto **Marjan Pipenbaher**, diplomita inĝiniero pri konstruado, specializita pri struktura kaj kontraŭ-terrema inĝinierado. Pri projektado de pontoj li okupiĝas jam 35 jarojn, kaj la Ponto de Peljeŝac estos lia vivoverko. Liaj kompanioj *Ponting* kaj *Pipenbaher Consulting Engineers* okupiĝas nur pri komplikaj konstruaĵoj, 90-procente pri pontoj kaj viaduktoj.

Pipenbaher kiel bonan arkitekturon elstarigas tion, kio superas ĉiujn modojn kaj tempojn.

Li estas specialisto pri sismiko, geotekniko, analizado de vento-ŝarĝiteco kaj grandaj spanoj. Li projektas solvojn por la plej terskuaj lokoj, plej malfacilaj terenoj kaj plej grandaj valoj, golfoj kaj riveroj. El tiu aspekto, li estas internacie unu el la plej kompetentaj fakuloj. Ĉar la Ponto de Peljeŝac troviĝas en la regiono de granda sismaj aktivecoj kaj fortaj ventoj, la elekto de Pipenbaher por projektado de tiu grandega ponto, estis tute natura decido.

En la internacia konkurso por la konstruado de tiu ponto, konkursis la plej grandaj mondaj kompanioj, sed laŭ la decido de la kroata registaro, la ponton konstruos ĉina kompanio *China Road and Bridge Corporation*, kiu posedas bonajn referencojn. Aliaj konkursintaj kompanioj protestis kontraŭ tia elekto, sed ŝajne la decido de la kroata registaro estas definitiva. Kontraŭ la konstruado de la ponto parolis ankaŭ la membro de la prezidantaro de Bosnio kaj Hercegovino Bakir Izetbegović, opiniante ke ĝi endanĝerigas la suverenecon de Bosnio kaj Hercegovino, tro proksimas ĝian teritorian maron kaj limigas la rajton de tiu ŝtato aliri la internacian maron. Malgraŭ tiaj opinioj, Kroatio baldaŭ devus komenci la konstruadon, kiun fincos Eŭropa Unio. La Eŭropa Komisiono por tiu celo aprobis la sumon de 357 milionoj da eŭroj, uzotan ankaŭ por la akompana infrastrukturo (ŝoseoj, tuneloj, pontoj kaj viaduktoj). Se kredi la prognozojn, la konstruado devus daŭri ĉirkaŭ kvar jarojn.

Kompara 38-lingva vortaro

La forpasinta **Marinko Biluš**, arma muzikisto kaj muzik-instruisto en la arma lernejo, ĝis sia morto en 1988 estis unu el la plej aĝaj esperantistoj en Kroatio. Li partoprenis la 38-an Universalan Kongreson de Esperanto, kiu okazis en 1953 en Zagrebo. Sed tio malpli gravas ol lia senlima ŝato al Esperanto kaj aliaj lingvoj, kiun li heredigis al sia filo Ante.

Ante Biluš (nuntempe 88-jarulo) estas edukita kiel maŝinteknikisto, sed poste li diplomigis kiel inĝeniero en la sama fako. La unuan duonon de sia aktiva vivo li pasigis en fabrikoj, kaj poste laboris sur ŝipoj de la komerca floto. Dum la alia vivduono li instruis maŝintekniko en teknika lernejo.

Gravas por nia rakonto, ke la tutan vivon akompanis lin la ideo de esperantismo, heredita de la patro.

Krom Esperanto li finlernis kaj adoptis plurajn fremdajn lingvojn, kaj poste ekhavis la ideon verki la vortaron, menciitan en la titolo de ĉi tiu artikolo. Li planis kunigi diversajn lingvojn en unu libro kaj montri ilian netolereblajn grafion, prononcon kaj vortaron, fine la malfacilan lernadon. Temis pri unu el la neeviteblaj paŝoj.

Nia aŭtoro plenkore kaj plenanime estas konvinkita, ke la internacia lingvo Esperanto estas savo por la tuta homaro el estontaj militoj (kiuj certe okazados, eble bonŝance por ni – ne dum nia vivo), malegaleco, ekspluatado kaj aliaj malbonaĵoj, kiuj akompanas la militojn.

Nenion signifas la aktuala, sed nur pormomenta superrego de la angla, kies fortaj konkurantoj jam aperas!

La libron, aluditan en la titolo de nia artikolo, Ante Biluš komencis kompiladi kaj tradukadi (helpe de ekspertoj pri ĉiuj ĉi lingvoj, pli kapablaj ol li mem), proksimume antaŭ tridek jaroj. Nun tiu libro estas definitive preta por publikigo.

Ante Biluš tamen ofte demandas sin mem: ĉu li, kiel amatoro kaj neprofesiulo, rajtis



Ante Biluš

okupiĝi pri la fako de lingvistiko? Kaj li tuj respondas: absolute ĉiu homo, krom sia fako, havas ankaŭ alian, paralelan ŝaton kaj inklinon. Ĝi povas esti muziko, libro, teatro, sporto, farado de diversaj objektoj el ĉiapecaj materialoj, kartludo, montmigrado, drinkado, virinoj, ŝakludo ... Longas la vico!

Tiu paralela inklinio, latine nomata *ocium* kaj angle *hobby*, kroate nomiĝas simple *zanimacija!*

Se ne estus tiel, profesia lingvisto ne rajtus okupiĝi pri funkciado de la motoro de sia aŭtomobilo, ĉar temas pri la fako (ĉu ne?) „rezervita” ĝuste por nia aŭtoro.

Kvankam la verko de nia aŭtoro, do ankaŭ la eldonota libro (el la vidpunkto de edukita lingvisto) estos nesufiĉe preciza – tiu lingvisto, diras la aŭtoro, povas libere uzi ĝin por fari plibonigojn. Krome, la aŭtoro demandas: kion la kroata lingvistiko atendis ĝis nun?

Nun kiam Kroatio ne plu estas jugoslavia parteto, kaŝita

antaŭ la rigardoj de la mondo, la landon vizitas „armeoj” da fremduloj, nomataj turistoj.

Tiuj gastoj de la kroataj lando kaj popolo, verŝajne volonte ellernus ankaŭ kelkajn kroatajn vortojn. Ekzemple, la plej gravan vorton en la tuta homa vortaro: DANKON, se montriĝas okazo por uzi ĝin. Multaj dirus al ni ankaŭ: MI AMAS VIN. La kroata lingvo ne estas instruata en iliaj lernejoj, do ili bezonus vortaretojn. Sed malgrandajn vortarojn ni ne havas. Ekzistas dikaj kaj amplekseĝaj vortaroj de kelkaj „grandaj lingvoj”: germana, itala, franca, angla, rusa ...

Por helpi iomete al tiuj karaj gastoj, nia aŭtoro kompilas ankaŭ separaĵojn, alivorte eltiraĵojn el unuopaj lingvoj de sia vortaro.

La granda KOMPARA VORTARO, priskribita ĉi supre, enhavas ĉirkaŭ 1700 vortojn, tradukitajn al 37 lingvoj, kaj la separaĵo (aŭ *gvidilo*, kiel ĝin nomas la aŭtoro) enhavas ĉirkaŭ 450 vortojn, kiujn la gasto plej ofte bezonos en fremda lando.

Ĉiuj *gvidiloj* estas identaj vortare, laŭ sia grandeco kaj ĝenerala aspekto.

La sola, sed granda problemo de la aŭtoro estas, ke neniu el la turismaj organizaĵoj, lingvaj institucioj kaj estimataj unuopuloj ... pli ol centoj da ili, al kiuj li skribis, respondis al liaj petoj pri kunlaboro kaj presigo, respektive posta disdonado de la *gvidiloj* al turistoj.

Eble tamen ekzistas unu grupo da entuziasmuloj, kiuj respondos ĉi tiun demandon. La esperantistoj!



Mia unua alfabetlibro en Daruvar

La ekspozicio *Mia unua alfabetlibro*, kiu estis malfermita la 22-an de januaro 2018 en la Popola biblioteko kaj legejo de Daruvar, havigis grandan ĝojon al la lernantoj de Elementa lernejo *Vladimir Nazor*, kiuj vizitis ĝin dum la malfermo. La buntkoloraj libroj el 43 landoj de la mondo eksterordinare pliriĉigis la *Monaton de la ĉeĥa gepatra lingvo*, aranĝo kun abunda programo, dediĉita al la ĉeĥa minoritato de Daruvar, kiu tradicie rememoras pri sia deveno kaj konservas siajn ĉeĥajn radikojn. La ekspozicion kune organizis Bjelovara Esperantista Societo, Departemento Bjelovar-Bilogora kaj la daruvara biblioteko, sed la ĉefajn meritojn por ĝia okazigo en Daruvar havas s-ino **Tanja Novotni Golubić**, anstataŭantino de la departementestro.

Dum la malferma ceremonio en la plenplena salono parolis la direktorino de la biblioteko, s-ino **Romana Horvat**, kaj la programon gvidis s-ino **Tanja Novotni Golubić**. S-ino **Ana Marija Štruml Tuček**, prezidantino de la Asocio de ĉeĥoj kaj slovakoj en Kroatio, salutis la kunvenintojn nome de la du minoritatoj, kaj sekvis ŝian ekzemplon ankaŭ s-ro **Vladimir Bilek**, parlamenta deputito pri la ĉeĥa kaj slovakaj minoritatoj.

Aparte laŭde pri la ekspozicio parolis s-ino **Vanda Cegledi**, antaŭanto de la urbestro de Daruvar. Ĉe la fino alparolis la kunvenintoj **Josip Pleadin** nome de Bjelovara Esperantista Societo, prezentante la ekspozicion kaj la manieron de ĝia ekesto.

La ekspozicio estis uzita ankaŭ por disdoni diplomojn al lernantoj de Centro *Rudolf Steiner* el Daruvar pro ilia partopreno en la ekspozicio *La flugiloj de fantazio*, okazinta dum la pasintjara festivalo INTER-FEST en Bjelovar. La diplomojn disdonis membro de la ĵurio, s-ro **Berislav Rupčić**.

Prezidanto de Bjelovara Esperantista Societo donacis al s-ino **Romana Horvat**, direktorino de la gastiganta biblioteko, ekzempleron de la Esperanta traduko de *La trajno en la neĝo*.

La programon finis lernantoj de la Muzika lernejo *Bruno Bjelinski* el Daruvar, belege kantinte la *Himnon de kooperativanoj* en la kroata kaj Esperanto. La ekspozicion kune proklamis malfermita lernantoj de Elementa lernejo *Vladimir Nazor*.

La prezentitajn alfabetlibrojn oni povis trarigardi ĝis la 12-a de februaro, kiam la ekspozicio finiĝis. Pri la ekspozicio tre abunde raportis diversaj portaloj, radio-stacioj kaj gazetoj. Unu el la plej interesaj raportoj estas tiu de Radio Daruvar, kiun vi povas aŭskulti ĉe: <http://www.radio-daruvar.hr/moja-prva-pocetnica/>.

Bjelovara Esperantista Societo dankas al s-ro departementestro **Damir Bajš** kaj Departemento Bjelovar-Bilogora, kiuj senpage disponigis specialan buseton kun ŝoforo, kiu transportis la societanojn al Daruvar, por povi partopreni la malferman ceremonion.

Zdenka Polašek



Fotis: Berislav Rupčić



Aŭdienco ĉe la urbestro de Bjelovar

La 24-an de januaro 2018, la urbestro de Bjelovar, s-ro **Dario Hrebak**, akceptis en sia oficejo la delegacion de bjelovaraj esperantistoj, kiu konsistis el **Franjo Forjan**, **Zdenka Polašek**, **Nenad Margetić** kaj **Željko Saks**. Dum la akcepto la bjelovaraj esperantistoj informis s-ron urbestron pri la rezultoj de la festivalo INTER-FEST kaj transdonis al li specialan mapon kun la informaj materialoj pri la aranĝo.

La vizito estis uzita ankaŭ por informi la urbestron, ke Bjelovara Esperantista Societo dum 2018 intencas organizi en junio *Alp-Adrian Esperanto-Konferencon*, kaj en septembro sian tradician aranĝon *Esperantistoj de Bjelovar al sia urbo*. Ĝis la septembra aranĝo bjelovaraj esperantistoj ŝatus eldoni Esperantan tradukon de la romano *Fruaj tagoj* de Goran Tribuson. Oni planas organizi ankaŭ la tradicion *Deklamkonkurson* kaj eventuale rondan tablon pri la temo *Tuŝpunktoj inter kroatoj kaj poloj dum jarcentoj*.

La delegacio konigis al s-ron Hrebak la fakton, ke en 2019 Bjelovara Esperantista Societo festos 110-jaran datrevenon de sia fondiĝo. Tiujare la societo planas eldoni ampleksan kaj abunde dokumentitan monografion pri Esperanto en Bjelovar.



La urbestro de Bjelovar laŭde parolis pri la laboro de bjelovaraj esperantistoj kaj promesis daŭran subtenon de la Urbo, des pli, ĉar Bjelovara Esperantista Societo kaj Kroata metiista kaj laborista kultur-arta societo *Golub*, estas la solaj urbaj societoj kun tiel longa tradicio.

Franjo Forjan

La retejo de BES renovigata

Pasintjare, dum la pre-*paroj* por INTER-FEST, Bjelovara Esperantista Societo (BES) lanĉis sian novan retejon. Ĉar poste montriĝis kelkaj malglataĵoj en ĝia funkciado, la Estraro de BES decidis renovigi ĝin kun la celo plifaciligi la uzadon de la disponebla materialo, riĉigi ĝin per novaj eroj kaj plilarĝigi la informadon pri eventoj kaj projektoj de aliaj societoj kaj individuoj, konforme al la akceptita agadplatformo de kroataj esperantistoj, nomata KRESKO. La temon de la retejo diskutis la societa Estraro dum sia kunveno, okazinta la 31-an de januaro.

Pasintjare la retejon teknike prizorgis **Ivica Milovan** el Jastrebarsko, al kiu la Estraro sincere dankis pro lia laboro. Ekde 2018 la retejon prizorgos **Sanja Forjan Pleskina** el Jurdani. Al la BES-estraro ŝi jam proponis plurajn ŝanĝojn kaj prezentis la



Sanja Forjan Pleskina

novan skizon de la renovigota retejo. La Estraro akceptis ŝiajn proponojn kun kelkaj rimarkoj kaj proponataj ŝanĝoj.

Ekde nun la retejo de BES estos pli aktuala, pli facile uzebla

pro la nova grafika prezento kaj multe pli riĉa.

En sia pritakso de la estonta funkciado de la retejo, la Estraro de BES konsideris ankaŭ la rimarkon de **Olga Ŝtajdohar Pađen** el Zagrebo, kiu skribis al la redakcio de nia gazeto, ke oni nepre disponigu ĝin ankaŭ por libera elŝuto. Laŭ ŝia opinio, tio certe plipopularigus ĝin kaj plivastigus la rondon de ĝiaj legantoj. La Estraro de BES akceptis, ke la societa retejo enhavu ankaŭ apartan stokejon de *Kresko* por libera elŝutado tuj post la apero de ĉiu nova numero.

Ni devas mencii, ke la nova prizorgantino de la retejo estis tre aktiva kunlaboranto de Bjelovara Esperantista Societo dum la pasintaŭgusta INTER-FEST, aparte en la informa kaj dokumenta fakoj. Ŝi meritas pri foto- kaj filma dokumentado kaj la ekstera informado pri la festivalo INTER-FEST.

Multlingva Akcelilo startis

Kiel raportas *Eŭropa Bulteno* n-ro 117 (januaro 2018), la 10-an kaj 11-an de januaro 2018 en Zagrebo okazis la unua renkontiĝo de la 9 partneraj organizaĵoj de la projekto *Multlingva Akcelilo*. Temas pri dujara projekto aprobita de Eŭropa Unio kaj financata de Eŭropa Komisiono pere de sia programo *Erasmus +*. La projekto, en kiu partoprenos tri partneraj organizaĵoj el Slovenio, du el Kroatio kaj po unu el Slovakio, Germanio, Danlando kaj Bulgario (inter ili du universitatoj kaj tri elementaj lernejoj) celas plibonigi kaj plirapidigi lingvolernadon ĝenerale, uzante la materialon ellaboritan por la *Zagreba Metodo* de lernado de Esperanto. La projekton gvidas la zagreba eldonejo *Izvori* de esperantisto **Damir Mikuličić**.

La projekto formale startis komence de novembro 2017, kaj devus finiĝi fine de decembro 2019, sed la relan starton prezentis la januara kunveno en la zagreba hotelo *Palace*, en kiu partoprenis 18 reprezentantoj de ĉiuj partneraj organizaĵoj.

Por *Multlingva Akcelilo* estas elektitaj 242 plej oftaj morfemoj de la *Zagreba Metodo*, kiujn dum du lernohoroj semajne lernos triaklasanoj en bazlernejoj de Kroatio, Slovenio, Slovakio kaj Bulgario.

Interesaĵon kaj novaĵon prezentas la modelo, laŭ kiu Esperanton instruus eĉ instruistoj, kiuj ne parolas Esperanton. **Seán Ó Riain** en sia artikolo agnoskas, ke partopreno de neesperantistoj en la projekto iomete komplikas la komunikadon, sed li argumentas ke „kelkaj ecoj de la strukturo de *Esperanto* igas ĝin aparte taŭga por la plirapidigo de lingvolernado ĝenerale”. Li mencias la fakton, ke la morfemoj de Esperanto estas neŝangeblaj kaj libere kombineblaj, kaj ke tiuj morfemoj uzeblas kiel sendependaj vortoj, kiel en la ĉina lingvo. Laŭ **Ó Riain** „neniu hindeŭropa lingvo havas tiujn trajtojn, kaj aparte gravas ke lingvoinstruistoj

tra la *EU-landaro eksciu tion*”. Lingvolernado en Eŭropa Unio krizas. Ekde la Eŭropa Konsilio de Barcelono de 2002 la celo de Eŭropa Unio estas ke ĉiu ĝia civitano lernu almenaŭ tri lingvojn – la denaskan kaj du aliajn. Nun estas tute klare, ke la dominado de la angla en instrusistemoj malhelpas tiun celon, ĉar ĝi postulas troan lernotempon kaj malpligas la motivadon por lerni trian lingvon.

Laŭ **Zlatko Tišljár** *Mult-lingva Akcelilo* „devas produkti lernprogramon por nova volontula lernobjekto por triaklasanoj de bazaj eŭropaj lernejoj (antaŭ enkonduko de dua fremdlingvo – ĉar la unuan fremdlingvon nuntempe, kutime la anglan, oni enkondukas plej ofte jam en la unua klaso. Per tiu ĉi lernobjekto oni grave plirapidigas la lernadon de dua kaj postaj lingvoj (25-30%). Oni produktos didaktikajn rimedojn por *Multlingva akcelilo*, kiuj uzos maksimume modernan informatikan teknologion. La bazo estos portalo por instruistoj kaj gelernantoj. Kompletan novaĵon prezentos ellaboro de generilo de demandaj frazoj, kiujn kreos komputilprogramo kaj ĉiutage demandos la gelernantojn per demandoj konsistantaj nur el vort- kaj gramatik-elementoj lernitaj ĝis tiu momento”.

La dua parto de la projekto estos elprovado de tiu didaktika materialo dum dumonata kurseto, gvidata de fremdlingvoinstruistoj, kiuj paralele kun la gelernantoj lernos *Multlingvan akcelilon*. La akiritaj scioj poste akcelos la lernadon de dua kaj tria fremdlingvo, sed ankaŭ la komprenon de la propra gepatra lingvo.

La nekutima celo de la projekto estas, ke la *Lingvan Akcelilon* animacie gvidos instruistoj, kiuj ne konas Esperanton, sed instruas nur baze de la instrukcioj en la portalo. Tiamaniere ne necesos krei apartan instruistaron, asertas **Zlatko Tišljár** en sia artikolo en *Eŭropa Bulteno*. La du unuaj instrumonatoj okazos jam fine de la lernojaro 2017/2018, kaj la partneroj okazigos en septembro la duan partnerrenkontiĝon en Bratislavo, kie oni pridiskutos la spertojn de tiu fazo de la projekto. Je la demando de nia redakcio pri la detaloj, **Zlatko Tišljár** respondis, ke post la bratislava renkontiĝo la partneroj ellaboros definitivan didaktikan materialon por la tuta unujara lernobjekto, konsistantan el 64 lernohoroj, kaj portalon de *Multlingva Akcelilo*.



Erasmus+



Partneroj de la projekto *Multlingva Akcelilo* la unuan fojon renkontiĝis en januaro 2018 en Zagrebo



Postdiplomaj Interlingvistikaj Studoj en Poznań (Pollando)

Inter la 4-a kaj la 10-a de februaro 2018 okazis la dua sesio de la partoprenantoj en la Postdiplomaj Interlingvistikaj Studoj. Ili venis al la Universitato *Adam Mickiewicz* en la vintra, tamen senneĝa kaj nur frosteta Poznań. Ĉi-foje aperis 14 gestudentoj el Ĉinio, Koreio, Turkio, Brazilo, Usono, Francio, Germanio, Hispanio, Rusio kaj Pollando. Dimanĉe, la 4-an de februaro, ili ekzameniĝis pri la Esperanta kulturo kaj fonetiko de Esperanto. Du tagojn poste, merkrede, okazis la ekzameno pri historio de la Esperanta literaturo (en la unua periodo: de la komenco ĝis la unua mondmilito). Kiel kutime, en la sama tago, vespere, la kursvidantoj kaj la gestudentoj kunvenis dum la komuna vespero, dum kiu ĉiuj povis mem proponi sian programon (muzikon, kanton, dancon, poemon, filmeton). La vespero pasis en la gaja etoso. Tiaj kunvenoj fariĝis jam tradicio. Ili ebligas ne nur komunan babiladon, sed ankaŭ renkontiĝon kun lokaj esperantistoj. En la aliaj tagoj oni studis intense komunikadon kaj Esperanto-gramatikon (prof. Iлона Koutny), morfologion kaj sintakson (M. Farris) kaj historion



Iлона Koutny

de la Esperanta literaturo (en la dua periodo: inter la mondmilitoj). Tiun lastan kurson gvidis kune Lidia Ligęza (poezio) kaj Tomasz Chmielik (prozo kaj dramato).

Post la sesio okazis unutaga ekskurso al Toruń – apudvistula urbo kun riĉa historio kaj multe da interesaj turismaj vidindaĵoj.

Pasintjare oni festis la 20-jariĝon de la Postdiplomaj Interlingvistikaj Studoj (IS). Ili estis fonditaj en 1997 per rektora dekreto en la Lingvistika Instituto de la Universitato *Adam Mickiewicz* (UAM, Poznań) – unu el la plej signifaj universitatoj de Pollando. La fondinto kaj gvidanto

de la Studoj estas prof. Iлона Koutny, kiu finis esperantologiajn studojn en la Esperanto-fako de ELTE (Eötvös Loránd Universitato, Budapeŝto, Hungario) ĉe prof. István Szerdahelyi kaj estis ties posteulo post lia morto (1987-1995). La studprogramo de IS sekvas la modelon de la iamaj internaciaj esperantologiaj studoj en ELTE, sed estas pli ampleksaj kaj proponas specialiĝojn en la tria jaro.

La internacia kursaro okazas en la Lingvistika Instituto, sub la gvido de prof. Iлона Koutny, membro de la Akademio de Esperanto. Inter la prelegantoj ĉiam estis kaj daŭre estas elstaraj esperantologoj, kiel profesoroj Humphrey Tonkin, John Wells, Aleksander Melnikov, Michel Duc Goninaz, Probal Dasgupta kaj Zbigniew Galor; doktoroj Vera Barandovská-Frank, Detlev Blanke, Katalin Kováts (Smideliusz), Blazio Wacha kaj Ulrich Lins; la poetino Lidia Ligęza, ekspertoj de sia tereno kiel Maria Majerczak, Tomasz Chmielik, István Ertl, Aleksander Korjenkov, Michael Farris kaj Bradjo Moro, Zsófia Kóródy, Barbara Pietrzak kaj Roman Dobrzyński.

La unua malgranda internacia grupo komencis siajn 3-jarajn studojn pri interlingvistiko en 1998. Ekde 2002 ESF (Esperantic Studies Foundation, Usono) disponigas kelkajn stipendiojn por la studentoj, kio ebligas pli grandnombrian partoprenon en la Studoj. Por la lasta grupo (2011-14) ankaŭ UEA-ILEI kontribuis al la stipendioj.

La postdiplomaj studoj kun sia ekstera formo (du intensaj semajnoj en ĉiuj 3 jaroj + la fina ekzameniĝo) altiras partoprenantojn el multaj landoj: la lastan grupon konsistigis komence 20 gestudentoj el 10 landoj de Pollando kaj Germanio ĝis Brazilo kaj Usono. La multnacia partoprenantaro nature kontribuas al la interkulturaj kaj kontrastaj studoj. La unusemajnaj intensaj sesioj okazas unufoje dum



la semestro (fine de septembro kaj komence de februaro).

En septembro de la pasinta jaro post 20 jaroj startis la 7-a interlingvistika grupo kun 20 partoprenantoj el 12 landoj (Ĉinio, Koreio, Turkio, Brazilo, Usono, Francio, Svisio, Germanio, Hispanio, Rusio, Kazahio kaj Pollando).

Dumtiu1-a Interlingvistika Sesio (16-20.09.2017): prof. Humphrey Tonkin gvidis la kurson pri esperanta kulturo, prezentante ĝin en vasta historia fono; al ĝi kontribuis prof. Aleksandr Melnikov pri rilatoj inter lingvo kaj kulturo kaj pri personeco de esperantisto; krome d-ro Jukka Pietiläinen pri esperantaj revuoj. Humphrey Tonkin ankaŭ enkondukis la esperantan literaturon de la unua periodo, koncentriĝante pri la poezio; sekvis lin Tomasz Chmielik kun la prozo de tiu epoko. Eblas aliri fonetikon samtempe interese kaj serioze – tion pruvis prof. Nicolau Dols Salas per sia kurso. Interlingvistiko (en pli malvasta senco) konsistigis la kurson de prof. Věra Barandovská-Frank, kiu jam povis uzi la proveldonon de sia universitata lernolibro pri interlingvistiko. Tiu ĝojiga evento malfermas la serion de lernolibroj

de la Studoj fontante el la 20-jara sperto.

La malnova grupo, kiu startis kiel rekorde granda, ankaŭ fine restis rekorda, ja 11 gestudentoj plenumis sian finekzamenon kun defendo de sia faklaboraĵo el la terenoj de lingvistiko (Karina Oliveira el Brazilo, Bengt Olof Åradsson el Svedio kaj Arina Osipova el Rusio), de interlingvistiko (Ida Stria kaj Michał Kozicki el Pollando), el lingvopedagogio (Félix Lobo el Hispanio kaj André Staes el Belgio), de komunikado (Johan Derks el Nederlando/Serbio) kaj de literaturo (Rafael Zerbetto el Brazilo/Ĉinio, Fernando Pita el Brazilo kaj Xesús Muñíos el Hispanio), aldone kiel la 12-a Paweł Fischer-Kotowski el la antaŭa grupo.

Kiel kutime, la lingvopedagogia specialiĝo de la tria jaro konsistigas la instruistan trejnadon al kiu eblas aparte aliĝi kaj ricevi la instruistan diplomon de ILEI. Ĉi-foje tri partoprenantoj el Pollando (Krystyna Worobiej, Markéta Wilkus kaj Mariusz Hebdzyński) kaj unu franco (Jean-Claude Roy) akiris ĝin post la prezento de sia finlaboraĵo kaj kompleksa ekzameno.

La Interlingvistikaj Studoj donas superrigardon pri ĝenerala kaj aplikata lingvistiko, fokusiĝas

al internacia kaj interkultura komunikado, traktas planlingvojn kaj detale okupiĝas pri gramatiko, literaturo, kulturo kaj historio de Esperanto. En la tria jaro eblas specialiĝi pri komunikado, lingvistiko, literaturo, tradukado, planlingvistiko aŭ pri lingvopedagogio. Pro la metodika formado la Studoj ricevas specialan rolon en la instruista trejnado. Ekde la studjaro 2007/08 ĝi realiĝas kunlaboro kun ILEI.

Unusemajnaj intensaj sesioj (surlokaj kursoj de po 4 studobjektoj kaj ekzamenoj) okazas unufoje dum la semestro (fine de septembro kaj komence de februaro), intertempe la gestudentoj laboras pri siaj taskoj hejme kaj konsultiĝas rete kun la prelegantoj. La gestudentoj pretigas diplomlaboraĵon kaj post la fina ekzameno ricevas atestilon pri Interlingvistikaj Studoj.

Postuloj al la ontaj gestudentoj: diplomo pri superagradaj studoj kaj bona scio de Esperanto. Partoprenantoj devas plenumi orientigan teston antaŭ la komenco de la Studoj komence de la unua sesio. Kelkaj stipendioj estas antaŭvidataj dank' al ESF (Esperantic Studies Foundation).

Tomasz Chmielik

Sinjoro Tadeo antaŭ la muzea publiko

La 10-an de januaro en la Muzeo de Sinjoro Tadeo en Vroclavo okazis la renkontiĝo *Sinjoro Tadeo en la lingvo Esperanto*. La programon kune preparis Eŭropa Centro de Interkultura Edukado kaj Muzeo de Sinjoro Tadeo. La renkontiĝon gvidis **Malgosia Komarnicka** kaj en la muzea librejo oni povis aĉeti la Esperantlingvan epopeon de Mickiewicz. Vidu: <https://muzeumpanatadeusza.ossolineum.pl/pl/wydarzenia/pan-tadeusz-w-jezyku-esperanto>

La konata tradukistino kaj poetino **Lidia Ligeza** konigis al la publiko la vivon de Ludoviko Zamenhof kaj la tradukon de la epopeo fare de **Antoni Grabowski**. **Malgosia Komarnicka** parolis pri la 130-jara historio de Esperanto kaj prezentis la biografion de **Antoni Grabowski** kaj lian penigan laboron por traduki *Sinjon Tadeon*.

Unika ero de la renkontiĝo estis aŭskultado de kelkaj fragmentoj el la verko, kiujn brajle tralegis en la pola **Wojciech Ławnikowicz**, la premiito de la



3-a konkurso *Vortbeleco en Esperanto*, kaj Esperante **Lidia Ligeza**.

La prezentita programo elvokis grandan interesiĝon de la publiko pri la lingvo Esperanto. La Muzeo de Sinjoro Tadeo kaj la Eŭropa Centro de Interkultura Edukado aŭtune preparos alian renkontiĝon kaj ekspozicion de malnovaj Esperanteldonoj de *Sinjoro Tadeo*.

Malgosia Komarnicka

Europejskie
Centrum
Edukacji
Międzykulturowej

Interkultura majrendevuo en Vroclavo kaj Góra (Pollando)

PROVIZORA PROGRAMO

La **19-an de majo** (sabato): provaŭdo de la *6-a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj* (pli detale vidu sur la paĝo 17).

La **20-an de majo** (dimanĉo): vizito al la *Muzeo de Sinjoro Tadeo* / koncerto de premiitoj de la *6-a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj* kaj invititaj gastoj / alveno al Góra / loĝigo / komuna vespermanĝo (kun dancoj...), kampfajro (laŭ deziro).

La **21-an de majo** (lundo): Internacia Simpozio / Czernina / Publika biblioteko en Góra, Filio en Czernina / 13h15

forveturo al Rydzyna – vizito al la kastelo kaj parko, 15h00 tagmanĝo en la kastelo / 16h15 forveturo al Gostyń, vizito al fabriko de fruktaj kaj herbaj teoj kun la ebleco de gustumado kaj aĉetado / vizito al Muzeo de malnovaj aŭtoj / 20:00 vespermanĝo en Góra, dancoj, kampfajro (laŭ deziro).

La **22-an de majo** (mardo): 10h00 laborsesioj de *Liściaki*, gvidas Elżbieta Wodała / Kulturdomo, klubeja salono / 14h00-15h00 *Hejma Nutraĵprovizo* / 16h00 laborsesio pri vitro – gvidas Anna Gałuszka / 19h00 vespermanĝo en Góra, dancoj, kampfajro (laŭ deziro).

La **23-an de majo** (merkredo): vizito al Góra / 14h00 tagmanĝo / 17h00 solena malfermo kun partopreno de urbestrino Irena Krzyszkiewicz / koncerto de JoMo / 20h00 vespermanĝo en Góra, dancoj, kampfajro (laŭ deziro).

La **24-an de majo** (ĵaŭdo): matenmanĝo / forveturo.

La organizantoj rezervas al si la rajton por ŝanĝi la programon.

Pri la detaloj de loĝado, manĝoj, prezoj ktp., bonvolu interesiĝi ĉe:

malgosia.eo@gmail.com



Ĉi-numere ni enkondukas specialan rubrikon **Rozoj kaj urtikoj**, en kiu ni publikigos pozitivajn kaj negativajn aferojn de nia movado. La pozitivajn, kiuj celas harmoniigon de nia agado, ni „premios” per **ROZO** kaj la negativajn, kiuj efikas malharmoniige, per **URTIKO**.



La 17-an de januaro la rusa kuracisto kaj esperantisto Konstantin Oljšin el Peterburgo skribis al ni, petante kontakton kun esperantistoj, kiujn li povus renkonti dum sia vizito al Kroatio en somero 2018. **Mato Ŝpekuljak** el Zagrebo, kiu konigis al ni lian peton, kaj **Ivo Osibov** el Split, kiu akceptis esti ĉiĉerono de s-ano Konstantin, meritas nian **ROZON**, ĉar temas pri pozitiva praktiko kaj uzado de Esperanto por amikaj celoj.



La 24-an de januaro **Judita Rey Hudeček** el Zagrebo, estrano de Kroata Esperanto-Ligo, sendis kroatlingvan retmesaĝon al 15 adresoj de kroataj esperantistoj, en kiu ŝi asertas, ke: „Ĉiujare koleginino (*Marija*) *Jerković* ricevas (financajn) rimedojn por vojaĝi al ILEI-konferenco ..., sed stariĝas la demando pri pravigo de tiaj vojaĝoj, se nek ni kiel Ligo, nek la Unuiĝo de Prelegantoj de Esperanto, havas utilon el tio.” Pro tia malbonintenca diskonigo de malvero, Judita Rey Hudeček meritas **URTIKON**. S-ino Marija Jerković nur unu fojon ricevis partan subvencion por ILEI-konferenco (Montevideo, 2014), post kiu ŝi ne partoprenis la aranĝojn de ILEI. La kongreson de ILEI en Hispanio en 2018 ŝi partoprenos mem pagante siajn kotizon kaj restadkostojn.



S-ino **Achtar Etemadi** el Teherano (Irano) ricevas nian **ROZON** pro la grandaj klopodoj diskonigi kroatian porinfanan literaturon en la persa lingvo. Per ŝiaj klopodoj antaŭe en Irano publikigis *Mirindaj aventuroj de metilernanto Hlapić* de Ivana Brlić-Mažuranić, kaj baldaŭ en la persa lingvo aperos ŝia traduko de la porinfana romano *La kapreolido Pirgo* de Anđelka Martić.

Azia paletro de Ho Song denove ekspoziciata

S-ino **Tanja Novotni Golubić**, anstataŭantino de la bjelovara-bilogora departementestro **Damir Bajš**, ĝojigis la loĝantojn de Daruvar per ankoraŭ unu interesa ekspozicio. La 8-an de februaro en la Galerio de Urbo Daruvar *Croatia osiguranje*, kunlabore kun Dokumenta Esperanto-Centro el Ĝurdevac kaj Bjelovara Esperantista Societo, estis malfermita la pentraĵekspozicio *Azia paletro* de korea pentristo kaj esperantisto **Ho Song**. Kvankam la pentristo mem fizike ne ĉeestis, lia virtuala partopreno per video-kontakto, projekciata sur granda ekrano, elvokis tre pozitivajn emociojn ĉe la publiko. En la momento de la malfermo en Koreujo estis la 3-a horo post noktomezo, sed la pentristo en sia posta retmesaĝo entuziasme komentis, ke por li tio estis *neatendita kaj tute nova sperto*. Evidente samopiniis ankaŭ la ĉeestintoj de la malfermo en Daruvar, ĉar la ekzpozicio en la oficiala retejo de Urbo Daruvar estas nomita „tre atrakcia”.

La ekspozicion malfermis anstataŭantino de la urbestro, s-ino **Vanda Cegledi** kaj la parlamenta deputito **Vladimir Bilek** (laŭ sia funkcio ankaŭ anstataŭanto de la urbestro). Mallongan muzikan programon prezentis profesoroj de la Muzika lernejo *Bruno Bjelinski* el Daruvar. Kiel anoncote, la ekspozicio restos malfermita ĝis la 5-a de marto kaj vizitebla ĉiŝabate inter la 11h00 kaj 13h00 kaj dimanĉe inter la 17h00 kaj 19h00. Dum resto de la semjno oni anoncu telefone sian viziton al la oficejo de la urbestro de Daruvar, n-ro **+385 43 331 241**.



GRAD DARUVAR
Galerio Grada Daruvara
„Croatia osiguranje”

U suorganizaciji Dokumentacijskog esperantskog centra iz Ĝurdevca i Društva esperantista Bjelovara, izuzetno nam je zadovoljstvo pozvati Vas na izložbu slika

južnokorejskog slikara
HO SONGA

8. veljače (četvrtak) 2018. g.
u 19,00 sati
u Galeriju Grada Daruvara
„Croatia osiguranje”,
J. Knytla 1, Daruvar



Izložbu možete pogledati od 8. 2. – 5. 3. 2018.
subotom od 11,00 – 13,00 sati i nedjeljom od 17,00 – 19,00 sati
a ostalim danima javiti se u Ured gradonačelnika 331 241

La fotoj pruntitaj el la
Fejsbuka profilo de
Urbo Daruvar



<http://daruvar.hr/otovrenje-izlozbe-juznokorejskog-slikara-ho-songa/>



**Eŭropa Festivalo
de Esperantaj Kantoj**
Europejski Festival Piosenki Esperanckiej

Inter la 19-a kaj 21-a de majo 2018, okazos la 6-a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj en Vroclavo (Pollando). La Festivalo okazas ĉiujare en majo en du kategorioj: **1. koruso aŭ ensemblo** kaj **2. solisto**. Ĉiu partoprenanto kantas du kantojn: unu en Esperanto, la alian en sia nacia aŭ fremda lingvo.

La sesan fojon kantante en Vroclavo

Pritaksataj estas nur Esperantaj kantoj. La festivalon organizas Eŭropa Centro de Interkultura Edukado el Vroclavo sub la patroneco de la vroclava urbestro. La laŭreatoj ricevas diplomojn kaj pokalojn, kaj ĉiuj partoprenantoj ricevas diplomon pro la partopreno.
Bonvolu aliĝi!

Pliaj informoj pri la festivalo ĉe: informado.eo@gmail.com

Boatado sur la rivero Kupa fariĝos 10-jara!

Antaŭ unu jardeko esperantistoj de Sisak unufoje organizis Esperanto-boatadon sur la rivero Kupa. Temas pri 135-kilometra surakva vojaĝo en specialaj lignaj aŭ plastaj motorboatoj, loke nomataj *šiklja*.

Sojle de la 10-jara jubileo de tiu aranĝo, la ĉefa organizanto **Srećo Radulović** la 21-an de januaro kune kun **Nataša Dorosulić** kaj **Josip Pleadin** vizitis la regionon de la rivero Kupa, respektive la urbon Karlovac kaj la vilaĝojn Šišljavić kaj Pokupsko.

Eĉ la fakto mem, ke la boatado okazos la dekan fojon, povas esti karakterizata kiel respektinda tradicio, sed oni devas fari certajn ŝanĝojn, por ke ĝi estu alloga por ĉiuaĝaj esperantistoj.

La 10-a boatado laŭplane devus okazi inter la **28-a de julio** kaj **5-a de aŭgusto 2018**. Aliĝontoj bonvolu konsideri, ke temas pri specifa aranĝo por **aventuremuloj**. Ĝi ne ofertas grandan komforton, ĉar oni tendumas en improvizitaj surbordaj bivakejoj kaj konsumas



kunportitajn aŭ surloke kuiratajn manĝaĵojn. **Ĉiu aliĝinto devus posedi minimume: tendon, dormosakon kaj manĝilaron.** Pro la restadkondiĉoj en la naturo, la organizantoj konsilas, ke aliĝu nur homoj **aventuremaj, sanaj kaj bonfartaj**, kiuj posedas sufiĉan **fizikan forton** kaj **naĝkapablon**, kiuj ne uzas fortajn medikamentojn kaj ne havas specialajn dietojn.

Ĉar la rivero Kupa estas turisme interesa, en 2018, okaze de la jubilea aranĝo, por la unua fojo ni proponas solvon ankaŭ por homoj, kiuj ne plenumas la ĉi-suprajn kondiĉojn.

Dimanĉe, la **29-an de julio** ni planas organizi unutagan ŝipekskurson (vidu la bazajn informojn ĉi-sube!), pri kiu pli detale ni informos vin en iu printempa numero de *Kresko*.

Por la 10-a boatado vi povas aliĝi kaj pli detalajn informojn ricevi ĉe:

boatado.kask@gmail.com

aŭ

esperanto.sisak@gmail.com

Por la ŝipekskurso vi povas aliĝi kaj pli detale informiĝi ĉe la organizanto de tiu programparto:

dec.kroatio@gmail.com

Ŝipekskurso sur la rivero Kupa



Por stimuli turismon en la regiono, sur la rivero Kupa trafikas la ŝipo *Zora*, konstruita kiel kopio de iamaj gren-transportaj ŝipoj. Ĝi estas konstruita per subvencio de Eŭropa Unio kaj trafikas de printempo ĝis aŭtuno por individuaj turistoj kaj organizitaj grupoj, kaj ekster tiu periodo nur por grupoj, laŭ mendo. Oni proponas itinerojn de 90 aŭ 180

minutoj ĝis kvinhora vojaĝo. La ŝipo ekveturas el la vilaĝo Brođani al Kamensko kaj reen, sed oni povas atingi ankaŭ la urbon Karlovac. Sur la ŝipo ekzistas sidlokoj por 55 personoj kaj organizeblas diversaj programoj.

Por ebligi viziton al la rivero Kupa ankaŭ al esperantistoj, kiuj ne ŝatas aventurojn, kiajn

proponas la 10-a Esperanto-boatado sur la rivero Kupa, en aŭgusto 2018 ni organizos komfortan ekskurson, kiu inkluzivos la busan transporton kaj ŝipan vojaĝon. Pli detale pri la ekskurso vi povos legi en venontaj numeroj. En difinita surborda loko ni renkontiĝos ankaŭ kun la aventuremaj boatantoj, por kuraĝigi ilin!




Milan Dobrovoljac Žmigavec

Nuntempe apenaŭ iu el niaj esperantistoj sciuis, kiu estis **Milan** (aŭ familiare **Milko**) **Dobrovoljac**. Perdiĝis en la tempofluo, ke tiu tre populara (precipe) kajkav-dialekta poeto, evangelia kaj poste grekokatolika pastro, estis ankaŭ tre fervora esperantisto en Požega (Kroatio) antaŭ la unua mondmilito. Des malpli konatas, ke li tradukadis poezion el la kroata kaj eĉ verkis originalajn poemojn en Esperanto. Li verkis sub la pseŭdonimoj *Tonček Žmigavec*, *Tonček Žmigavec iz Kratkih sel*, sed plej ofte kiel *Žmigavec*.

Li naskiĝis en Dugo Selo la 11-an de marto 1879. En Zagrebo li finis klasikan gimnazion kaj studis teologion. En 1901 li fariĝis kapelano en vilaĝo Trnje en la regiono de Intermurio (Međimurje), kie la hungaraj aŭtoritatoj politike akuzis lin kaj dum kvar jaroj li devis ŝanĝadi loĝlokojn. Forlasinte la pastran profesion, li ekstudis juron, poste studis en la Evangelia altlernejo en Sopron (Hungario) kaj Evangelia universitato en Rostock (Germanio). Sekve de tio li fariĝis evangelia parokestro en Požega.

Restas nekonate kiam kaj kie li lernis Esperanton, sed en Požega li estis bonega esperantisto kaj gvidis du Esperanto-kursojn jam en 1914. Tiuj kursoj estas konsiderataj la unuaj Esperanto-kursoj en Požega. Samjare li verkis tre trafan propagandan artikolon pri Esperanto en *Glasnik Županije Požeške*.

Dum la Unua mondmilito li estis juĝita de la milita tribunalo kaj certan tempon pasigis en la fronto. Fine de la milito li troviĝis en Krakovo (Pollando), kie li publike agadis inter poloj kaj akceptadis kroatajn militkaptitojn, revenantajn el la rusa kaptiteco. En 1921 li revenis al Dugo Selo, kie li okupiĝis pri ĵurnalismo, literatura kreado kaj politika laboro. Li estis politika disĉiplo de J. J. Strossmayer. Li fariĝis estro de la Jugoslavia sokola organizaĵo kaj trifoje li estis komisaro de la komunumo Dugo Selo. En 1927 li fariĝis adepto de la malnovgreka



eklezio. Unu jardekon post tio (1938) li estis elektita kiel deputito en la Popola parlamento (Narodna skupština) kaj unu jaron poste kun la familio li translokiĝis al Beogrado. Li estis deputito en la pli larĝa konsisto de AVNOJ (*Antifaŝistiĉko vijeće narodnog oslobođenja Jugoslavije* = Kontraŭfaŝisma konsilio de nacia liberiĝo de Jugoslavio) en 1945. Li emeritiĝis en 1954 kaj ĝis la fino de sia vivo li estis malnovgreka episkopo por Serbio, Vojvodino kaj Kosovo, rezidanta en Beogrado.

Li verkis porinfanajn versojn kaj en humure-satira tono skribis pri politikaj eventoj de sia epoko, karikaturante diversajn personojn el la politika sfero (ekz. la kroatan politikiston Stjepan Radić, kiu cetere estis esperantisto!).

En la tempo de sia okupiĝo pri Esperanto, li verkis originalajn poemojn en la Internacia Lingvo, kaj Esperantigadis kroatajn poeziaĵojn. Li versis facile, por la bezonoj de ĵurnalismo kaj popola religia literaturo, kio reflektiĝis

ankaŭ en liaj malmultaj Esperantaj poemoj. Esperanto estis lia junaĝa ŝatokupo, kiun li forlasis tre frue post la unua mondmilito.

Li mortis en Beogrado la 13-an de marto 1996.

Por la unua fojo ni represas apenaŭ nun trovitan lian originalan Esperantan poemon *Jam printempa...*, kiu aperis en *Germana Esperantisto*.

Krom ĝi ni konas ankoraŭ nur unu poemon, *Nigra nokto*, kiu aperis en *La Zemuna Esperantisto* n-ro 6 (30) en la jaro 1914.

Jam printempa...

*Jam printempa sun' fortiris
De la tero neĝan kruston;
La naturo kun violoj
Jam ornamis sian bruston.*

*Vent' varmeta kaj facila
Kisas montojn kaj kamparon,
Salutante la birdetojn
Revenantajn en arbaron.*

*Alaŭdeto en aero
Kantas sian himnon belan,
Laŭdegante ĉiopovan
Patron sanktan kaj ĉielan.*

*Kamparano laborema
Kampon sian ĝoje plugas,
Frugilegoj lin sentime
Krietante ĉirkaŭflugas.*

*Ho, printempo kun belaĵoj,
Kiam vi sur ter' ekstaras,
Ĉiam al animo mia
Vi predikon mutan faras:*

*Certe ankaŭ min atendas
Post la morto – vintro mia –
Belprintempo en ĉielo
Ĉe Savinto mi, dia.*

Milko Dobrovoljac,
evangelia pastro
Požega (Kroat-Slavonujo)

En: *Germana Esperantisto*,
januaro 1914, paĝo 40.

Viaj opinioj

Trevor Steele (Aŭstralio): Dankon pro la sendo de *Kresko*. Mi ĝojas, ke per ĝi la movado viglas en via mondoparto (eĉ se papera revuo ne plu aperas – la sorto de tiom da iamaj publikigaĵoj). Sukceson al via entrepreno!

Françoise Noireau (Francio): Via gazeto estas belaspekta kaj interesa. Kaj feliĉe ke aperis ankaŭ artikolo pri Davor Grgat. Dédé same kiel mi konsterniĝis – via vorto trafas – pro lia forpaso. Li estis mia tuja amiko, en Bjelovar ni kune ĉiun matenon apude kaj samtempe matenmanĝis kaj ŝercadis.

Stani Rynduch (Pollando): Kun ĝojo mi trastudis la duan n-ron de *Kresko*, kiu ne nur estas majstre redaktita, sed enhavas interesajn informojn uzeblajn en por-esperanta agado. Mi persone gratulas kaj deziras sukcesan agadon kaj sukcesojn en estonteco.

Judit Felszeghy (Hungario): *Kresko* estas bele, altnivele farita revuo kun riĉa enhavo! Gratulojn!

Andreo Sochacki (Pollando): Koran dankon pro la sendo de ege interesa *Kresko*. Mi admiras vian pluan agadon en Esperanto. Gratulon pro via bela iniciato kaj vere leginda reta periodaĵo!

Ivano Bujdoso (Hungario): Gratulon al la sprita elekto de la nomo de la nova retgazeto!

Faruk Islamović (Zagrebo): *Kresko* estas profesie farita gazeto, plena je interesaj temoj. Vi levis laton tro alte kaj mi esperas, ke en venontaj monatoj kaj jaroj vi sukcesos elteni tion.

Elda Doerfler (Italio): Mi plue legos ĉiujn viajn *Kresko*-jn tre volonte. Ĝi fakte estas informplena kaj tre riĉenhava. Tre interesis min la artikolo *Esperanta ĵurnalismo kaj gazeteldonado en novaj teknologiaj kondiĉoj*. Kun ega bedaŭro en la gazeto mi trovis la informon pri la forpaso de estimata, ege vigla kaj aktiva, s-ro Davor Grgat.

Renato Corsetti (Britio): Dankon pro via revuo, kiu iĝas ĉiam pli revua. Dankon ankaŭ pro la mencio de la itala kongreso.

Roberto Maglica (Zagrebo): Dankon pro la nova numero. Mi estas agrable surprizita pri la anoncitraj prelegoj en Radnički dol – mi klopodos ĉeesti.

Vinko Ošlak (Aŭstrio): Dankon por la 2-a numero de *Kresko*, tre riĉa enhavo kaj en bona lingvo. Mi permesas al mi sendi al vi mian artikolon, skribitan aparte por via bulteno, se vi trovas ĝin publicinda kaj publicebla en iu el viaj sekvaj numeroj.

Janja Kelava (Varaŝdin): Mi ŝatas vidi, ke oni sukcesas en la aferoj pri kiuj oni okupiĝas. Tial mi gratulas, ĉar ĉi tio havas bonajn vibrojn!

Dimitrije Janičić (Serbio): La dua numero estas pli bona kaj pli riĉa ol la unua. Ĝi estas escepte bone preparita enhavo kaj aspekte. Kondolencojn por la bona homo kaj bona esperantisto Davor Grgat.

Petro Chrdle (Ĉeĥio): Mi gratulas al la tuta teamo malantaŭ la bela kaj interesa bitgazeto *Kresko* kaj petas vin envicigi min en la dissendoliston. Mi tamen demandas, ĉu vi metas *Kreskon* en iun retan datenarstorilon kien eblus reveni ankaŭ al malnovaj numeroj.

Kerstin Rohdin (Svedio): Dankon por la nova numero de *Kresko*. Ĝi aspektas tre bela kaj profesia.

Ian Fantom (Britio): Mi volas gratuli pro via iniciato. Mi nur bedaŭras, ke en Britio la afero entute lamas. La magraj periodaĵoj kiuj nun venas de nia landa asocio estas nuraj propagandiloj.

Berto Ŝuman (Francio): Ne nur la aspekto belas, ankaŭ la enhavo, kaj eĉ la longa teknologia artikolo rilatas *Kreskon*.

Vera Payne (Aŭstralio): Vere bedaŭrindas, ke vi ricevis kelkajn malafablajn respondojn al la unua *Kresko*. Al la kulpuloj, kvankam eble flujaj parolantoj kaj skribantoj en Esperanto, verŝajne tute mankas kompreno de la profunda celo de D-ro Zamenhof nepre al la kreo de sia kaj nun nia Internacia Lingvo. Sincerajn bondezirojn por la daŭra sukceso de *Kresko*. (Cetere, tre plaĉis al mi la foto de la belulineto prizorganta la planteton en la numero 2.) Mi antaŭĝuas la trian numeron.

Rafael Cabrera Espinosa (Kubo): Mi estas impresita de viaj aktivecoj kaj taksas vian informilon kiel specialan trezoron. Mi ĝojas, ke vi havas la vizon por sendi ĝin al aliaj kluboj. Feliĉon ankaŭ en la estonteco.

KRESKO monata informilo

Eldonas:

*Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj (UZE),
Jarunska 6, 10000 Zagreb*

Retadreso de la redakcio:

zagreba.esperantisto@gmail.com

Redaktas: Josip Pleadin

Kresko aperas en la lasta tagdeko de ĉiu monato.

***Kresko* estas libere distribuebla,
kopiesbla kaj citebla.**